Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich, D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Ognjena Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio

Lingva kontrolanto Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I, BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2 dol. = 25 N. Din.
Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje naučna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije Svetosavska 16 Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva esperantista). Za izdavača: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović, (Ognjena Price 80, Beograd)

Štampa: »Vuk Karadžić«, Niš; Stanka Paunovića 72. — Telefon 25-444.

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 20
N-ro 1 (77)
1. 2. 1969.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 din

Enhavo:

C. C. Guglilminetti: Dante, kreinto de interregiona lingvo, Zamenhof, kreinto de internacia lingvo
A. Belov: Herooj kaj martiroj de scienco — Luĉilio Vanini
A. Albault: Kion oni sciu pri la katarakto
Mytropolskyj, Bogatyrev, Matvijiŝyn: Pri evoluo de la reduktoteorio por diferencialaj ekvacioj

408.3/5: Dante
408.92 : Zamenhof

DANTE, KREINTO DE INTERREGIONA LINGVO: ZAMENHOF, KREINTO DE INTERNACIA LINGVO

(Prelego en Internacia Somera Universitato, Rotterdam 1967.)

(Clelia Conterno Guglilminetti, Torino, Italio)

Estimataj geamikoj,

Ne atendu multon de mi: tio, kion mi volus diri al vi ne estos klera esplorado de filologia laboro de Dante. Mi nure klopodos trovi alproksimigon, cetere ne facilan, inter la patro de la itala lingvo kaj la aŭtoro de la internacia: ankaŭ mi, kiel Dante diris, invitas vin al modesta „*convivio*", bankedo, „tiel, ke la unua prirezonado kaj la dua bongustigu la manĝon por tiuj, kiuj al tiu ĉi vespermanĝo estas invititaj. Tiujn ĉi mi petas, ĉiujn, "— kaj mi alpropriĝas al mi la vortojn de Dante —" se la bankedo ne estus tiel luksa kiel estus dece . . . ke ne mian bovolon, sed mian kapablon ili kulpigu pro ĉiu manko (I Conv. I, 18—19).

Cetere, kiel proksimigi du personecojn, kiuj transcendas la limigojn de naciecoj kaj tempoj, kiuj estis samtempe si mem kaj la tuta homaro, kiam ĉio, fronte de neĝisfunda ekzamenado, ŝajnas elmontri neforigeblajn diversecojn? Dante, ankrita al sia kredo kaj al sia scienco; Zamenhof, preta forĵeti sian kredon kaj sian propran personecon favore al ia supera religiemo kaj al ia ajn solvo, eĉ malsama de la propra, de la problemo kiu lin tuta okupis. Eĉ fizike, iliaj du figuroj ŝajnas multe diferenci.

Sed fatale okazas, ke la homoj elstarantaj el la banala ŝablono de nia ĉiutaga vivado por postsekvi ian sian altan idealon havas ian komunecon de trajtoj, kiu ebligas ilian kunproksimigon. Tiel estas por la homo kiu skribis:

„Ho Lum' eterna, kiu sola sidas
en vi, vin konas sola, kaj konata
kaj konanta, vin amas kaj alridas!"

(Par. XXXIII, 124)

kaj por la homo kiu deklaris:

„Sub la nomo de Dio mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro." (Dogmoj de Hilelismo)

La vidpunktoj estas malpli distancaj ol ili ŝajnas unuavide; kaj cetere la vortoj de Zamenhof strange reeĥas la vortojn de Dante „kaj kiel — interne diktas ĝi — mi esprimas min", kio estas ja la fama difino de la „dolĉa nova stilo" (Purgatorio).

Dante grandas sur la monda scenejo per la potenco de sia arto kaj de sia personeco: lia konstruo estas granda katedralo, por ĝin diri kun Waringhien; lia religia kaj politika koncepto estas grandioza kaj ekskluziva: du sunoj, la papo kaj la imperio, lumigantaj la mondon: „du Sunojn havis, kiuj ambaŭ vojojn — vidigis, kaj de l'mondo kaj de Dio" (Purg. XVI, 106). La homaro estas prikantita kun potenco ĝis tiam nekonata: li mem diras, al Cangrande della Scala (kaj al ni posteuloj), ke temo de lia poemo estas *la homo*. Universala poeto, do: tion oni povas diri de la poetoj, kiuj faris sin vere voĉo de la mondo, en kiuj la ĉiutempa homo, la ĉiulanda homo retrovas, rekonas sin, kun sia sentaro, siaj larmoj, siaj ribeloj, sia kono-soifo: tiel ni ploras kun Andromaka l'ankoraŭ vivantan Hektoron, tiel ni trem-esperas kun la milda Julieto el Verono, tiel ni trovas kun Goethe pacon sur ĉiuj montpintoj. Simile, Farinata kaj Uliso kaj Ugolino, Franciska kaj Sapia kaj Pikkarda parolas nian idiomon, tiun de niaj sentoj, mi volas diri, kiu vere estas universala idiomo en la tempo kaj en la spaco.

Pri Dante, pri lia neregebla karaktero, pri lia obstina fiereco oni jam tro multe parolis por ke mi insistu pri ĝi, kaj cetere li mem tion scias kaj agnoskas.

Zamenhof, male, estas entute sindona, entute rezignema, entute humila. Lia konstruaĵo estas detale preciza laboro; li ne estas artisto — eĉ ne en tia subtila poezia rivereto kiu trakuras lian laboron de honesta verkisto; lia personeco ne estas potenca, sed, por tiel diri, en minora tono, mallaŭta, introvertita; li ne kantas la homaron, li ĝin ame servas. Lia filozofia kaj politika konceptaro (viviganta lian verkaron kaj lian agadon, samkiel la dualismo Imperio-Papeco vivigas la verkaron kaj agadon de Dante), sumiĝas en idealo kiu devas esti interna en ĉiu homo, kiel ĝi estas interna al la kreaĵo de Zamenhof mem, nome homaranismo, frateco, amo, spirita kompreno, ne nur materia: „Mia patrujo mi nomas tiun regnon, en kiu mi naskiĝis aŭ en kiu mi por ĉiam enloĝiĝis", tio estas ĉio politika kion li diras al ni: sed lia flago, kiu havis „kiel sanktan ordonon nur unu vorton, konkordo" (Z., Parolado en Krakow, 1912), estas la nura standardo en la mondo kiun homa sango neniam makulis.

Agnoskinte tiujn ĉi malsamecojn, estas al ni tamen eble proksimigi inter si, spirite, tiujn ĉi du kultantojn de la homaro, ĉar ili havis inter si komuna unu grandan revon: la unueco de la lingvoj. Dante revis pri unu itala nacia lingvo enradikita sur la diverseco de la dialektoj, kaj kuraĝis konkretigi tiun ĉi revon konfidante al tiu lingvo sian plej grandan verkon, kaj, fine do, sian ekzistadon trans la vivolimo en la memoro de la homoj. Zamenhof revis pri unu internacia lingvo burĝonanta el la plureco de la lingvoj naciaj kaj havis la obstinan paciencon, kiel mi scias, krei ĝin kaj lukti por ĝia venko; ambaŭ diris pri sia kreaĵo: „la lingvo kiu ĉie aŭdiĝas, sed kiu estas nenies propraĵo"; ambaŭ asertis, ke la unueca lingvo (interregiona-internacia) jam ekzistis potenciale en la naciaj lingvoj, kaj sufiĉis ĝin eltiri en la lumon; ambaŭ kontraŭbatalis la opinion, ke la lingvoj estas io sennaska, io natura en la homo, fakto intima kaj ne meĥanika; kaj Dante, kiu superis sian polan fraton per la kapablo la flughava sintezo, tiel resumis, ĝin metante en la buŝon de Adamo en la Paradizo, tiun ĉi teorion:

„Natur' efikas, ke la hom' parolas;
sed tiel aŭ aliel, ĝi vin lasas
konduti poste laŭ belplaĉo via"

(Par. XXVI, 130)

Kaj al Dante „belplaĉis" verki la komentarion, al la kanzonoj kolektitaj en la „Convivio" (kaj mi memorigas, ke „Convivio" estas verko kie Dante prezentas *la panon* de la pritraktado kun *la butero* de poemoj)

per tiu ĉi nova lingvo, la itala *vulgara* lingvo (parolata de la popolo), kaj ne per la latina: *kion neniu antaŭ il kuraĝis fari.* Kial ne per la latina?

FORLASO DE LA LATINA LINGVO

Ĉar, — diras Dante — la latina estas lingvo rigidiĝinta, jam fiksita en la altegaj modeloj kiujn ni konas, dum la vulgara estas vivanta, „la vulgara laŭplaĉe artefare povas esti ŝanĝata": lingvo evoluanta, do. En la spaco de kvindek jaroj, diras Dante, kiom da vortoj, en vivanta lingvo „estingiĝas, naskiĝas, variiĝas" (Conv. I, V, 7—9 kaj skv.). Se en tiom malmulta tempo la homoj aliiĝas, laŭ sia plaĉo aŭ neceso, vivantan lingvon, kiel ni povas kredi la latinan vivanta? „Se la antikvaj Romanoj renaskiĝus, ve," subridetas Dante, „ili kredus sian urbon okupita fare de fremda gento". La latina estas do fiksita, neŝanĝebla, en unu formo, nobla formo ja, „kiun oni ne povas traŝanĝi, tiun saman kiun ni hodiaŭ havas". Kaj mi aldonas: la *hodiaŭ* de Dante estas ja nia hodiaŭo. La latina estas la latina: ni ne tuŝu ĝin je favoro: ĝi estas „ĉiamdaŭra kaj nekoruptebla". Tamen (mi aludas al tio nur preterpaŝe), la verko de Dante pri vulgara elokventeco (=parolkapablo) jam ne plu estas skribita en la klasika latina kiun li juĝis „ĉiamdaŭra kaj nekoruptebla", kiel ni vidis. (Ekz., inter la neologismoj, elstaras kelkaj tre amuzaj, kiel tiu *depompare* (=forpumpi) la miton de la toskana dialekto kiel itala lingvo, kaj tiu *infroniti* (=obstinaj), pri la Toskanoj kiuj tion kredas). La lingvo de „De vulgari Eloquentia" ne estas jam plu la latina, sed ia hibridaĵo, distanca de Cicero kiom la nuntempa itala de la itala lingvo de Dante.

Sed la latina, Dante aldonas, ne povas esti internacia lingvo pro du kaŭzoj: unue, ĉar oni ne rajtas aliigi ĝin, pro la fakto ke ĝi do ne estus jam la latina; due, ĉar, diras Dante, „vi nekredu ke la latinistoj estas tro multaj: la latina ne estas parolata inter multaj malsamlingvanoj kiel estas la vulgara, kaj konskvence ne povas atingi la *amikojn de la vulgara* . . . ; per la latina oni povas konversacii kun *kelkaj* amikoj de la vulgara; tamen ĝi mem ne estas bone konata al ĉiuj, kaj pro tio ne povas atingi siajn amikojn tiel perfekte, kiel la vulgara, ĉar estas postulata konado perfekta, kaj ne difekta" (Conv. I, VI, 9).

Resume, Dante diras: mi volas komprenigi min de multaj, kaj la scipovantoj de la latina estas elito; inter tiuj, krome, malmultegaj posedas sufiĉan parolkapablon. Ni dubas, ke Peano legis tiun ĉi paĝon antaŭ ol forlasi la tiam junan Esperanto-movadon kaj la Komitaton de la Delegitaro, (kun indigno pro la misfaroj de tiuj, kiuj esperis personan gloron aŭ profiton), por sin dediĉi al sia „latina sine flexione": Dante mem estus lin atentiginta pri la „latina ne bone konata al ĉiuj" kaj pri la „difekta konado" de la „kelkaj amikoj de la latina" . . .

Dante insiste pravigas sian kuraĝan forlason de la latina ankaŭ kiel literatura lingvo: tian kuraĝon ne havis Petrarca, kies latinlingvaj poemoj mortis, per kiuj li kredis pluvivi, kaj kies Rimoj kaj Triumfoj, itale verkitaj, pretervivis, kiujn li juĝis banalaĵoj. Dante riskis sian gloron per la ludkarto, kiu montriĝis atuto, kaj Petrarca savis sian famon per ludkarto, kiun li opiniis senvalora. Hej, diras Dante, la publiko ne konsistas el latinistoj; por lerni tiel komplikan lingvon, oni bezonas ian kvanton da klero, kiun ne ĉiuj havas, kaj multaj estas, male, „tiuj, kiuj deziras kompreni . . . , tiel beletristoj, kiel tute simplaj homoj, kaj la vulgara estas komprenata tiel de la unuaj, kiel de la dauj" (Conv. I, VII, 12). Li skribos poste, en „De Vulgari Eloquentia", ke la latina estas *„locutio secudaria"* al kiu *„pauci pervenerunt"* (duaranga lingvo al kiu malmultaj alvenis), kaj ili eĉ bezonis multan tempon; dume, en la tempo de Dante la vulgara estas uzata en la tuta mondo, eĉ se disdividita en diversajn *„prolationes"* kaj *„vocabula"* (elparoloj kaj vortoj). Ekzistas potenciale internacia lingvo en la eŭropaj lingvoj, „ĉar ŝajnas, ke multaj aĵoj estas nomitaj per la samaj vortoj" (D.V.E. I, VIII, 6); la eŭropaj lingvoj havas komunan substancon: kaj Dante citas tutan serion da vortoj komunaj al diversaj lingvoj.Tio okazas ankaŭ pri la interregiona lingvo, la itala, glora, ĉarnira, (ĉirkaŭ kiu turniĝas la dialektoj), kortega, jura, kiu jam estas entenata en la multobleco de la regionaj vulgaraj, neniu el kiuj, kaj des malpli la toskana (Kaj kia toskana? La Florenca, tiu el Prato, el Pisa, el Siena, el Lucca, el Arezzo . . . ?), estas, aŭ povos estiĝi, la interregiona lingvo, la itala. Samtiel neniu nacia lingvo povus plenrajte atribui al si mem la rolon de internacia lingvo: kaj, dirante *plenrajte,* oni ne aludas la ratjton kiun donas la perforto, milita aŭ politika, tio estas la ebleco domaĝi la aliajn naciojn, metante ilin en malfavorajn situaciojn, precipe kiam la decidoj dependas de la parola lerteco.

Dante, ni diris komence, fieris, ke li estas la unua verkinto de komentario en la vulgara lingvo: neniu kuraĝis, ĝis tiam, ĉar la vulgaran oni tiom spitis. Oni opiniis, ke la vulgara ne povas naski literaturon; ke en la vulgara oni ne povas eldiri „altegajn kaj novegajn konceptojn", kiel oni povus en la latina. Tamen, en tiu ĉi granda novaĵo sur la kampo de la lingvoj, kio estas, en la XII. a- XIV. a jarcentoj, la itala vulgara, oni povas, kaj devas, poeti, diras Dante; plie, ne *omnes versificantes*", ĉiuj versfarantoj rajtas provi (ili uzu siajn dialektojn...), sed nur la *„excellentissimi"*, la elstaraj. Kaj kion kanti per ĝi? La savon, la amon, la virton (*„salus, venus, virtus"*), respondas Dante: la frivolaĵojn oni lasu al la dialektoj. Ĉiuj plej noblaj temoj estas pritrakteblaj en la vulgara, tute nature, ĉar ĝi estas pli natura ol la latina, dume la latina, estas io artefarita (D.V.E. I. I, 4). *Artificialis* tiel, ĉar ĝi estas io

fiksita en sia miljara daŭro, kiel ĉar akirita per seka studado. Nu, la netuŝebla idolo de la ĉiutempaj kleruloj, difinita de Dante *„loquela artificialis"*, artefarita lingvo...

Sed kio estas, do, tiu de Dante nomita „Volgare Illustre", nobela, altnivela vulgara lingvo? Ĉu ekzistas homoj kiuj ĝin parolas?

DANTE ARTEFARINTO DE ITALA LITERATURA LINGVO

Jes, ekzistas homoj kiuj ĝin parolas kaj skribas en ĝi: Dante intencas diri, homoj kiuj ne parolas aŭ skribas en sia dialekto, sed en tiu ĉi nova aĵo kia estas la itala vulgara, la interregiona lingvo. Ili estas Guido Guinizelli, Cino da Pistoia kaj „ties amiko" (*„amicus eius"*), kaj tiuj, sed precipe la „amicus eius", t.e. li mem, Dante, „el tiom granda diverseco de dialekoj, de elparoloj, de konstruoj, de vortoj (mi tradukas el D.V.E., I, XVII, 3) ĝin faris tiel nobla, libera, perfekta kaj urbana (*„tam egregium, tam extrinsecatum, tam perfectum, tam urbanum"*). Tiel Dante mem proklamas senrezerve sian rajton esti konsiderata la patro de la itala lingvo. Ĉu malhumila aserto? Nu, Dante mem tion suspektas, verdire, kaj li sin punas pro tiu ĉi kaj pro aliaj fieraj asertoj, kiam li renkontas Sapia'n, en la Purgatorio, inter la enviuloj:

„Ankaŭ mi perdos tie ĉi l'okulojn"..., sed
„Tro pli l'animon mian igas dubi
timego pro l'turmento suba, tiel,
ke tiu ŝarĝo jam nun sur mi pezas"
(Purg. XIII, 136)

Kaj tamen tiu de Dante, lume de la faktoj, ne estis malhumilo, sed alta fiero. Li unua ĉasis al la fuĝema „pantero", al la interregiona lingvo, al la itala lingvo antaŭ ol Italujo ekzistos; li mem, unua, asertis ke unu Italujo ekzistas, Italujo unueca laŭ kulturo, laŭ spirito kaj kun propra lingvo, eĉ se Dante sin klinas al priploro de la mankanta politika unueco (mi tradukas el D.V.E., I, XVIII, 5): „Eĉ se unu kortego, t.e. ununura registaro, kiel la kortego de la Germana Imperiestro, en Italujo ne ekzistas, tamen ne mankas al ĝi la membroj; kaj kiel la membroj de tiu germana imperio estas unuigitaj de ununura princo, tiel la membroj de tiu ĉi Italujo estas unuigitaj de la lumo bonfara de la rezono. Pro tio ne veras diri, ke la Italoj ne havas gubernion, kortegon, kvankam mankas unu unika princo; ĉar unu kortegon ni havas, kvankam materie disan"; kaj, kiel oni povas paroli laŭvice de dialekto el Cremona, de Lombardia dialekto, de norditala dialekto, tiel devas ekzisti tutitala lingvo.

Sed la itala, la „nobla itala lingvo", la superregiona lingvo, ĉu ne estos io artefarita? Por ni esperantistoj estas ofta pridemando. Kaj ankaŭ Dante deturnas la frapon, forigas la suspekton, ke temas pri utopio, ĉar (diras la homoj) la lingvo estas io naskita kun ni, samnatura al ni; kaj kiel oni parolus artefaritan lingvon, lingvon kiu (diras Dante) „estas de ĉiuj urboj kaj ne ŝajnas ies proprajo"? (D.V.E. I, XVI, 6).

La lingvistoj scias, kaj ankaŭ Dante, ke unu vere natura lingvo ne ekzistas, kaj ke des malpli ĝi estas io nedisigeble nia kiel la penso; male, „la lingvo estas nenio alia ol la ilo, la rimedo necesa por eldiri niajn konceptojn, samkiel la ĉevalo estas nur ilo por la soldato" (D.V.E. II, I, 8). La lingvoj estas kiel la vestoj aŭ la kutimoj, rebatas Dante, io ekstera al ni, kaj ili naskiĝas laŭ nia bonvolo (D.V.E. I, IX, 10). Kaj sekve ni povas libere eltiri la nian el la plureco de la dialektoj. Jen, tion intencis Dante: el tiu ĉi cemento li konstruis la „sanktan poemon"; ton li lasis al la italoj kiel heredaĵon, krom la poemo. Kaj por tion fari, li ekprenis ian sian kribrilon, diras li mem en „De Vulgari Eloquentia", kaj kribris la diversajn italajn dialektojn. Sed, ĉar Dante estas impetega, kaj havas tiun malfacilan karakteron kiun oni ja bone konas..., la kribrado okazas kun ia... troa energio. Unuaj inter la flankepuŝataj, la Romanoj; poste, la homoj de Ancona kaj de Spoleto, de Milano kaj Bergamo, de Aquilea kaj de Histrio, kaj plie kaj plie, neniu eskapas, des malpli la Torinanoj kaj la Aleksandrianoj; kolera, ironia aŭ spita, dokumentante ĉiam akurate, Dante, ve, ĉiufoje trafas la celon. Ni ne povas citi: estus tro ofende, oni ne pardonus nin... pli facile oni pardonus Dante'n, ĉar oni tro amuziĝus legante, en tiu lia drapirita mezepoka latina, eĉ la insultojn per kiuj nuntempe unu parto de la italaro kutimas regali la alian. Ĉu vi scias ke estas antagonismo inter N—S?

Kio restas en la kribrilo, post tia prilaborado de dialektoj? Nenio kaj ĉio: la pura itala, kiu ne estas proprajo de iu ajn urbo kaj tamen aŭdiĝas en ĉiuj. Kiu ĝin posedas, plipurigitan de la arto? Dante deklaras aperte: l'„amicus eius", l'amiko de Cino da Pistoia, kiel li ŝatas sin mem difini ĉiufoje kiam li parolas pri si mem. Tio estas: nur li.

Ĉiam, kaj prave, oni glorigis Dante'n kiel poeton, oni lasis flanke la filologon sur kies lipoj naskiĝas la demando, tuj je la renkonto kun Adamo en la Paradizo: „Kian lingvon vi parolis?"; la filologon kiu imagas, responde, ties fervoran aserton de la artefariteco de tiu lingvo Adamo diras: „kaj kian lingvon uzis mi kaj faris". En la itallingva verso **„io"** estas dusilaba kaj la dusilabeco de **„io"** (mi) (Par. XXVI, 114) plene reliefigas la altan fierecon de Adamo, unua aŭtoro de lingvo por la homaro. Ho, certe, ne ĉiam estas facile kaj, ni estu honestaj, alloge sekvi Dante'n tra liaj fonetikaj aŭ morfologiaj rezonadoj, tra lia traktado pri

stilo kaj metriko. Sed, se la italoj nomas Dante „la patro de nia lingvo", eble tamen ili ne konscias ĝis kie li estis tia, vere, kortuŝe, obstine; kaj, se ni esploras la verkon de Zamenhof kaj lian agadon, ni ne povas fermi la okulojn fronte al la analogioj kiujn ni malkovras inter Dante kaj Zamenhof, inter la ambaŭa „longa studo kaj amego".

Amego: kun kia pasio Dante defendas sian amegon, sian „perfektegan amon" al sia vulgara, tiel ke la stilo fariĝas nerva, mova, varma en mallongaj periodoj, kelkfoje eĉ dramecaj, en la XIIa ĉapitro de la unua libro de „Convivio"! La ĉapitro kiu malfermiĝas kun la imago de domo brulanta.... „Se klare de la fenestroj de domo elirus flamo de fajro, kaj se iu demandus ĉu tie estas fajro, kaj iu alia respondus jese, mi ne scius bone juĝi kiu el ili du estas pli mokenda. Kaj ne malsame estus pri dialogo inter iu kaj mi, se li demandus al mi ĉu estas en mi amo al mia propra lingvo kaj mi respondus jese, post ĉio kion mi diris supre" (Conv. I, XII, 1).

En la komparo kun la domo brulanta (kaj plurloke Dante rediras: „la amo kiun mi havas al mia vulgara") evidentiĝas la tuta ardado de Dante por tiu alia entrepreno, doni nacian lingvon al Italujo. Same, alia homo, tiom malsimila al Dante en siaj karakterizoj moralaj kaj eĉ fizikaj, kiel ni diris ĉe la komenco, metis plorante sianjunecon en la altaran fajron:

„Kion havis mi plej karan,
la junecon, mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta".

Ankaŭ Zamenhof — kuracisto, ne lingvisto, kaj ni memoru, preterpaŝe ke ankaŭ Dante estis oficiale „kuracisto kaj apotekisto" — ekiris al la serĉado de la internacia lingvo el la plureco de la lingvoj, kaj ankaŭ Zamenhof estis vidinta, ke lia kreaĵo jam ekzistis potenciale en la vorttrezoro de la naciaj lingvoj: sufiĉis ĝin eltiri en la lumon. Plie, ĝi mem estos lumo, precipe al tiuj, kiuj serĉas sopire, en nia tera nokto farita el miskompreno kaj malamo, la fratan manon de homoj alilingvaj kaj alilandaj. „Lumo — ankoraŭ foje ni voku Dante je nia helpo — lumo nova, suno nova, kiu suriros kie la kutima suno subiros, kaj donos lumon al tiuj, kiuj estas en mallumo kaj malklaro pro la kutima suno kiu por ili ne lumas" (Conv. I, XIII, 12).

Ne estis nova ideo, tiu pri internacia lingvo. Ĝia historio estas longa: ĝi ekmoviĝas de fore, de la II. a jarcento post Kristo, kiam la neceso naskas ĝin pro la premado kaj enfiltriĝo de la barbaroj en la posedaĵojn de la latina mondo — ne nur materie, sed ankaŭ, interalie, de la lingva vidpunkto. Ŝajnas, ke la unua serĉanto de artefarita solvo por

la lingva problemo misformiĝis dum la Mezepoko ĝis la serĉado, ne de lingvo parolebla de ĉiuj (pazilalio), sed de sistemoj korespondantaj al filozofiaj skemoj. Dum la Mezepoko daŭris la peno enfermi la konceptojn en kategoriojn, donante al ĉiu kategorio specialan signon — litero, cifero, ideografaĵo. Poste oni disdividis, ĝenerale, en tiuj sistemoj „pazigrafiaj" (skribaj por ĉiuj), ĉiun vorton en la konceptojn kiujn ĝi enhavis, kaj oni skribis ĝin uzante la literojn, aŭ la ciferojn, aŭ la ideografaĵojn korespondantajn al la diversaj konceptoj kiuj kunestadis en la vorto mem. Per tiu malproksimiĝo de la teorioj de Dante (la lingvo internacia jam enestis en la naciaj, same kiel la nacia jam enestis en la dialektoj tute nature), tra la jarcentoj tute senutila laboro por la celo de internacia lingvo disvolviĝas, ĝis la ventoblovo de la eksperimenta metodo forbalaas la regantan „*ipse dixit*" (Aristotelo diris) — ĝis Descartes, por precizo; kiu, en fama letero al patro Marsenne (Descartes, Oeuvres complètes, Parizo 1897, vol. I, p. 76), eldiras la karakterizojn de internacia lingvo: gramatiko simpla; sistemo de afiksoj sur radikoj el la komuna subgrundo de la ariaj lingvoj; Lingvo, do, ŝajnus, parolebla kaj skribebla kiel ĉiuj aliaj „eĉ por la simplaj kapoj".

La projekto de Leibnitz por realigi tiujn ĉi principojn de Descartes estis trovita de Couturat komence de tiu ĉi jarcento; temas pri manuskripto el pli ol mil paĝoj, el kiu, tamen, tra multaj provoj, ŝajne ne eliris vere parolebla lingvo. Devos pasi kvincent jaroj post Dante, oni devos trairi la arbaron da projektoj komplikaj kaj strangaj (Dante diris: „ne branĉoj glataj, sed implike nodaj") por alveni al la ankoraŭ hibrida Volapük de Schleier.

Tiel ni alvenas al la fina celo, kiun tamen jam indikis preskaŭ ĉiuj lingvistoj kiuj sin okupis pri la problemo ja sen indiki praktikan indiki praktikan finsolvon.

Zamenhof alvenis mem al tiu ĉi lasta celo, tra longaj jaroj de pasia studado, de luktoj, de provoj. Ankaŭ en li enestis fajra amo por tiu lia kreaĵo, kaj, eĉ pli, por la homaro kiun li revis frata: faru, ke la homoj povu paroli inter si, povu sin kompreni, kaj iliaj malamoj falos. Dante estis dolore dirinta: „Ni, al kiuj la mondo estas patrujo kiel al la fiŝoj la maro... ni eltenu nejustan ekzilon." (D.V.E., I, VI, 3). Zamenhof estis en situacio multfacete simila, li, hebreo nek pola nek rusa.

La unua kaj la alia devis fronti la samajn akuzojn por triumfigi sian idealon, la lingvon „nenies propraĵo"; kaj estus interese sin demandi (kun respondo preskaŭ certe nea), ĉu Zamenhof konis tiun paĝon de „De Vulgari Eloquentia" (I, XVI, 4—6) el kiu multajn frazojn li rediras, vorton post vorto, kaj ĉu li konis tiun pecon de „Convivio" pri la „abomenindaj akuzoj „kiujn la strat-homoj, la kutimaj senkapaj homoj de la XIV. a kiel ankaŭ de la XX. a jarcentoj („homoj vi estu, ne sensencaj

ŝafoj") ĵetas kontraŭ la nova lingvo, ĉi ĝi estas la itala, „Nobla Vulgara" de Dante, aŭ la Esperanta, „Internacia Lingvo" de Zamenhof; tio estas, la akuzoj venas pro nekonfeseblaj kialoj (Conv. I, XI, 2 sekv.): *„blindeco ĉe la juĝado"*, juĝi la lingvon sen koni ĝin, blinde; *„malica ekskuzado"*, kredi, nur ĉar oni mem ne konas ĝin, kaj do oni ne scias ĝin uzi, ke ĝi ne povas havi literaturan valoron; *„deziro al fanfaronado"*, vantemo, ĉar oni konas unu aŭ pliajn fremdajn lingvojn; *„motivo de envio"*, „ĉar — diras ĉiam Dante — unu ĝin ne scias uzi kiel ĝin uzas la alia, naskiĝas envio' kaj eble ankaŭ ĵaluzo, pro la timo ŝajni malsupera al tiuj kiu la novan lingvon (vulgara aŭ Esperanto) akceptis kaj penis lerni; *senkuraĝo de la koro"*, la eterna timo ŝajni ridinda, kaj admiro al ĉio, kio estas eksterlanda; kaj mi ne kuraĝas rediri la bruligajn vortojn kiujn Dante uzas pri siaj kontraŭuloj tiamaj: „laŭ kies kondukado iras la bilnduloj pri kiuj mi aludis ĉe la unua akuz-kialo", la homoj kiuj ne scias pensi per sia proprakapo kaj diskutas kaj prijuĝas sen koni tion (vulgaran aŭ Esperanton) pri kio oni parolas.

Ni devas agnoski, ke la simileco, mi eĉ dirus la egaleco inter la respektivaj pozicioj de Dante kaj de Zamenhof estas vere surpriza.

Kaj, se ni priatentas la karakterojn, malsamajn pro tiom da signoj, de tiuj ĉi du kredintoj je la universalaj valoroj de la homo, ni devas tamen rekoni, ke de l'unua kaj de la dua venas al ni, finfine, sama leciono pri anima firmeco, de homoj kiuj daŭrigis, fiere — aŭ humile — ĝis la fino de sia homa vivo.

Kaj la fina venko de la lingvo kreita de Dante (tra la opozicioj de la kleruloj de la malfrua XVI.a jarcento kaj la malklerigo dum la tuta XV.a), en la majesta florado de la itala Renesanco, estas bonaŭgura, por ni, de la fina venko ankaŭ de la lingvo kreita de Zamenhof, la milda sciencisto kiu rifuzis la nomon „majstro" kaj volis „kutimigi la homojn vidi en sia proksimulo nur homon kaj fraton".

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 1

179.6:001 (Luĉ. Vanini)

HEROOJ KAJ MARTIROJ DE SCIENCO

LA SORTO DE LUĈILIO VANINI

(A. Belov, Moskvo, Sovetunio)

Lia vivo estis mallonga kaj belega. La tutan ĝin li dediĉis al servo por scienco, ĉar li kredis, ke nur scienco kapablas kompreni kaj ekspliki la mondon, kiu vastiĝas ĉirkaŭ ni, diveni la misterojn de la universo, la mirindajn enigmojn de la naturo.

Luĉilio Vanini naskiĝis en la suda Italio, en vilaĝo Tavrizano. Nesatigebla soifo pri scioj, neordinaraj kapabloj de la knabo jam ekde la junaĝo atentigis pri si.

La knabo Luĉilio forlasis la hejman vilaĝon kaj venis Romon por „atingi sciencojn". Ĉi tio okazis en limo de XVI kaj XVII jarcentoj.

Soife studis li astronomion, anatomion, jursciencon, matematikon, teologion... „Mi neniam rezignis kiun-ajn bonŝancon por lerni ion, konvinkita, ke ni scias ege malpli multe kompare kun tio, kion ni ne scias", — skribis poste Vanini.

Li estis 21-jaraĝa, kiam en Napolo oni lin solene vestis en doktoran tunikon. Antaŭ la juna sciencisto, doktoro de jurscienco, malfermiĝis grandaj vojoj en scienco. Sed Vanini denove sidiĝas sur studentan benkon por daŭrigi la studadon. Li aŭskultas prelegojn de famaj sciencistoj kaj filozofoj en Romo, Napolo, Padovo, poste en Germanio, Svisio, Anglio. Pri sciavido Vanini estis nesatigebla.

La konatiĝo kun verkoj de elstaraj filozofoj tiutempaj, de sciencistoj naturesploristoj alkonodukis lin al profunda pensado. Ĉu ĝuste tiel estas konstruita la mondo, kiel eksplikas teologoj? Ĉu vere la tuta naturo, ĉiuj ĝiaj fenomenoj estas regataj fare de dia providenco? Per dia volo estas facile ekspliki nekompreneblajn fenomenojn, pri kiuj plenas la naturo, sed ĉu estas vera ĉi tia ekspliko?